

# Tagiĝo 26

*Cirkulero de Esperanto-Junularo en ĈRS.  
Eldonas Dŭm osvĕty, odbor Esperanto, Opava – 1955/IV,  
adr.: Kuzník, J. Rooseveltova 17, Opava*

## PRIPENSO POR PLUA AGADO

antaŭ la nova elekto de komitato de Esp. Junularo en ĈSR.

Pasis jam denove unu jaro de la lasta tutŝtata junulara kunveno, kiu okazis la 1-an de aŭgusto en Hradec apud Opava kaj ni preparas por ree kunveni en Otrokovice la 9-an de Julio, kie ni ĉe okazo de "La Tutŝtata konferenco de esperantistoj pacdefendantoj" havos denove nian ĉiujaran junularan tutŝtatan kunvenon, por tie priparoli kio estis dum la pasintaj 11 monatoj en nia Esp. movado farite. Kaj tial ni jam nun rigardu iom malantaŭen kaj ni taksu nian agadon.

Ni diru ke el vidpunkto tutŝtata la entuziasmo ĉe nia junularo iom estingiĝis, ke kompare al la pasintaj jaroj ni ne donis ĉiujn niajn fortojn por la plivigligo de junulara movado. Tion oni povis observi ne nur en agado de grupoj, sed tiu ĉi malvigligo jam fontis el la laboro de ĉefaj funkciuloj de Esp. Junularo. Anoj de Centrejo senescepte de ĉefdelegito ne plenumis ĉion kio estis farenda. Tamen ni diru, ke funkcio de kultura delegito kompare al la pasinta juro estis plenumata multe pli bone ol kiam ajn en estinteco. Ankaŭ ni ne povas esti tute kontentaj kun la laboro de regionaj delegitoj, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne plenumis ĉion kio estis postulata el la enhavo de ilia funkcio. Tamen grandan aktivecon kaj oferemon montris reg. delegito de reg. Brno-Gottwaldov - Jihlava, kie lia laboro maturiĝis en la belajn rezultojn ĉe la Esp. grupoj en tiu ĉi teritorio. Kion faris la lokaj delegitoj estas malfacile ĝenerale taksii. Kelkaj grupoj ekfloris, aliaj denove ekdormis - tiel tio okazis ĉiujare kaj eble okazos eĉ en estonteco. Ĉiam dependas la sukceso de la grupa laboro de unu aŭ du bonaj gvidantoj, kiuj per propra personeco kapablas vivteni la aktivecon kaj sukceson de grupo, se tiuj unuopuloj aŭ ilia entuziasmo malaperas, ankaŭ la vivo de grupo fariĝas enua kaj malprospera.

La tempo kiam nia ĉeĥoslovaka junularo prenis ĉiun laboron kun verve kaj kiam ĝi havis ankaŭ brilajn sukcesojn eble jam pasis. Kie serĉi la kaŭzon? Ĉu la tiamaj fervoruloj perdis sian entuziasmon? Ĉu ili fariĝis pli apatiaj al la junulara Esp. movado? Mi pensas ke tio ne estas la ĉefa kaŭzo. - Eble ĉiutaga okupiteco en propra profesio, en fabrikoj kaj oficejoj ne permesas doni pli por pli aktiva Esperanto agado. Nia grava manko estis ke ni ne edukis novajn junajn anstataŭantojn kiuj povus transprenadi la funkciojn en la movado por plue kun entuziasmo direkti nian movadon al novaj sukcesoj.

Vero estas, ke en niaj vicoj ekzistas tiuj juna j fervoruloj, kaj ĉi tie estis la tasko de reg. delegitoj malkovri ilin kaj postuli ilian laboron nor pli va:sta kadro de esperantistoj. En tiuj homoj povis havi reg. delegitoj la ĉelojn kiuj direktus la parton de la regiono kaj respondecus pri la agado de tiuj ĉi grupoj al la centra regiona delegito. Ilia senpera pli proksima kontakto kun grupoj en malgranda teritorio certe alportus la fruktojn.

Kaj nun, kiam ni solvos la demandon: kiun elekti kiel ĉefdelegito de Esp. junularo en nia lando, ni eble ne tiel pene devus serĉi ilin. En malfermita letero, kiun sendis ĝisnuna ĉefdelegito al ĉiuj funkciuloj kaj al ĉiuj grupoj, li priparolis la neceson demisii el la funkcio de ĉefdelegito pro la diversajn objektivajn kaŭzojn en propra profesio k.t.p. Tial ekestas por ni demando kiel aranĝi junularan agadon. Tiu ĉi malfermita letero vokis ĉiujn grupojn pritrakti la aferon, sed bedaŭrinde neniu el ili sendis ian ajn konkretan proponon kiel solvi la antaŭ ni starantan estontecon. Ni esperu, ke dum la tutŝtata kunveno en Otrokovice ni sukcesos kontentige aranĝi tutan aferon.

Por la plua jnro ni lernu el la mankoj kiujn ni faris kaj sukcesojn kiujn ni en estinteco festis ni multobligu kelkfoje.

Ni prenu kelkajn fortojn de St. Kamarýt el la artikolo: "Maljunulo alparolas junularon." publikigita en Bulteno nro 27-28/1955:

"Junaj geamikoj, transprenantaj de ni la torçon, malimitu niajn erarojn! Vi prenas torçon modestan kun flameto bezonanta prizorgon, sed kiu ne rajtas estingiĝi. Akceptu ĝin kun tia modesteco, kun kiu ni ĝin transdonas. Ne grandaj vortoj faras grandajn farojn. Sed firma volo kaj konvinko. ... "

Via Centrejo.

## Esperantistaro – popolo GASTIGEMA

Rapidvagonaro proksimiĝas al Bohumín. Jam estas videbla tabelo kun nomo de la stacio. Iom lacigite de longa veturo mi leviĝas el mia seĝo kaj elvogoniĝas. Rekte el la stacidomo mi iris al "Kultura domo de ĈSD", kie okazos E-konferenco de regiono Ostrava kaj Olomouc.

Mi eniris la salonon de kunveno. Ĉiuj signoj en la ĉambrego atestis, ke ĉi tie okazos io poresperanto. Sur la scenejo staris du viroj, preparantaj lastan aranĝon de la solena dekoracio - Esperarito-flagon kun ĉeĥlingva poresperanta teksto. Ili prezentis sin al mi kiel s-roj Kermely kaj Trombala. Kelkaj amikecaj vortoj... kaj kora interparolo fluas. Ni parolas pri nunaj malfacilaĵoj de nia movado, unue pri malfacilaĵoj lokaj, due pri malfacilaĵoj ĝeneralaj. S-ano Kermely proponas, ke ni iru en la kranverŝejon. Ĉi tie ni jam parolas pri privataj problemoj, pri problemoj de nia ĉiutaga vivo. S-ro Kermely mendas vinon por ĉiuj tri, mem pagante ĉion. Mi protestas, sed mi estis delikate silentigita. Parolante pri malfacilaĵoj de nia klubo, mi subite rememoris, ke ĝis nun mi ne havas kie dormi. S-ano Kermely min certigas, ke li prizorgos por mi tranoktejoj. Mi ne plu zorgas spri io.

La horloĝo montras, ke jam estas pli bone foriri, ĉar ni parolis dum tre longa tempo. Niaj paŝoj direktas al la plej bona hotelo en Bohumín. Pordisto diras, ke li havos nenium unulitan ĉambron liberan. S-ro Kermely, kiu lin bone konas, kontraŭstaras: "Sed por nia amiko vi ja devos havi ion liberan." La pordisto tuj donos al mi la hotelan aliĝilon. Mi elpoŝigas monujon kaj mi volas pagi, sed s-ro Kermely pagis anstataŭ mi. Tre surprizita mi volas rekompenci, sed li volas de mi nenion kaj aldonas: "Vi estas studento, tial vi devas akcepti mian gastigon, mi mem ankaŭ studis kaj mi bone konas la malfacilaĵojn de miaj tempoj studentaj." Li aspektis kvazaŭ li estus preta senti sin ofendita, se mi ne akceptus. Poste ambaŭ samideanoj iris kun mi kaj kun pordisto en la hotelĉambron, por vidi ĉu mi komforte loĝas. Ili adiaŭis dezirante al mi agrablan nokton.

Tiutage mi enlitiĝis kun varma sento, ke mi apartenas al granda esperantista familio kiel neniam antaŭ tio.

Sekvantan matenon mi celis al "Kultura domo" por partopreni konferencon. Jam ĉe la pordo min bonvenigis s-ro Kermely, demandante min, kiel ni dormis. Li estis ĝojigita, kiam mi respondis, ke mi estas treege kontenta. Poste konocis la regiona kunveno, kie estis pritraktitaj diversaj problemoj de Esp. movado. Ankoraŭ multaj amikaj interparoloj post la kunveno kaj ĉiuj denove adiaŭas, kaj rapidas al la stacidono por kapti la trajnon. Sed ne ĉiuj. Mi decidiĝis veturi per pliposta rapidvagonaro kaj dum restanta tempo trarigardi la urbon. Kiam mi menciis pri la afero, tuj mi havis tri komplezajn akompanantojn el Ostrava. Ili prizorgis enirbiletojn por iu kultura entrepreno en Ostrava kaj ni ĉiuj travivis belan vesperon.

Tiaj kaj similaj travivaĵoj okazas al homo, kiu venas inter esperantistojn. Kiaj homoj estas esperantistoj? Se ni starigus antaŭ nin ĉi tiun demandon, la respondo certe atestus favore al esperantistoj. En mannoj de esperantistoj kuŝas rimedo, kiu povas esti uzota por utilo de tuta homaro - esperantista amikeco. Valoro de la verda amikeco estas des pli granda, ke ĝi estas praktikata ne nur enlande, kiel montras niaj okazaĵoj, sed precipe en granda internacia skalo. Pri tio povus paroli homoj, kiuj havis eblecon viziti iun fremdan landon kaj renkontiĝi kun samideanoj. Mi estas feliĉa estante esperantisto kaj mi fieras ke mi apartenas al nia verda familio, kiu havas

## *Nova ido de Esperanto*

Dum pasintaj monatoj estis al esperantistoj kaj al aliaj personoj en nia lando dissendata presaĵo kun propono de skriba kurso de "Esperantština". Tiu ĉi fuŝaĵo de Esperanto estis proponita de Globus Studio, poŝt. schr. 241, Praha I, plue filie en Brno, kaj Jablonec n/Nisou. Ĝi estis aldonita kiel leĝe permesita manuskripto de aŭtoro Jaro ŜeLezný. Per metodo Globus aranĝis Dipl.sc.pol.Dr Jar. Tichý. Permesita per la dekreto de ONV-54-XX-ŠO.

Eksciinte tiun ĉi novaĵon, mi skribis al supre citita adreso, petante sendi al mi ankaŭ la kurson por pristudi ĝin, samtempe mi deziris kontakti kun sinjdro Dr Jar. Tichý. Kia estis mia surprizo ricevinte respondon rekte de li, kie li notas, ke okazis malagrablaĵoj, ĉar pro lia misatento estis elprenita el arkivo erare la ekzemplero de tiel nomata "esperantština", helpa lingvo, kiun kreis iu s-ro ŜeLezný kaj kiu estas starigita el Esperanto de Zamenhof.- Tiu ĉi ekzemplero estis donita en preson kiel origina propono de aŭtoro, sed kiun ili en preson doni ne intencis. S-ro Tichý skribas, ke ekestis el tio multaj malagrablaĵoj ne pro ĝia eldono, ĉar tio estas afero de koncerna "esperantština", sed tial, ĉar ili mem deziris eldoni kurson de Esperanto, kiun kreis Dr L.L.Zamenhof.

Plue notas s-ro Tichý en la letero al mi: ..ĉar ni retiras ĉiujn dissenditajn ekzemplerojn, ni ne povas ĝin sendi al vi, ĉar ĝi estas arkiva afero, kaj se vi interesiĝas pri Esperanto kaj deziras ellerni ĝin, ni esperas, ke ni interkonsentos kun la Klubo de esp. en Praha ĉe OB 2 kaj ke ni povos doni al vi poste raporton ĉu la kurson de Esperanto ni eldonos ....

Nur estas interese, kiel estis eble eldoni prese iun "esperantština", se lernolibrojn de Esperanto ni prese eldoni ne povas? - Vere afero pripensinda!! - Do restu ĉiuj, kiuj iom malkvietiĝis pro tiu ĉi afero, denove kvietaj, ĉar esperantština estas nur stelo kiu aperis sed jam malaperis en la nokta mallumo.

Kuzník Jaroslav

## *NAZO DE ATHANAZO*

Julio Baghy

Kiel kukurbo en florvazo  
palmo giganta en oaz',  
kiel tre teda parafrazo  
estis la naz de Athanaz'.

Ĉar nun sin donis la okazo.  
nia fiera Athanaz'  
akre respondis kun emfazo:  
"Tamen ĝi estas - mia naz!"

Foje knabeto kun ekstazo  
staris en ombro de la naz'  
kaj ĝin primiris per ĉi frazo:  
"Tur' babilona el topaz!" -

Lernu moralon el la frazo  
de sinkontenta Athanaz'  
kaj fanfaronu, se la bazo,  
estas sendube - propra naz'!

## *Ĉu vere*

A: Antaŭ la edziĝo vi pronesis plenumi eĉ mian plej etan deziron.

B: Tute prave, karulino, sed vi havas tiom da demandoj kaj deziroj, ke mi ne povas ekkoni, kiu el ili estas la plej eta.

- o - o - o -

Ŝi: Ĉio en nia domo apartenas al mi: mono, mebloj, tolaĵo, ĉio, ĉio. Kaj kion vi havis antaŭ nia geedziĝo?

Li: Pacon, mia kara.

- . . . . . -

Turisto en Egiptio admiras grandegajn piramidojn meditante: "Vere pravas la proverbo, ke la amo kapablas ĉion. Rigardu nur, kiel malgrandaj estas la piroj kaj kiel grandegaj estas piramidoj."

o . o . o . o

## NI HELPAS AL NI!

Učební texty z esp. literatury (J. Kořínek: Esperanto kaj poezio) i s výborem básní Vám může poskytnout Jan Werner, Brno, Helceletova 16, od 1. 8. 1955.

Kdo by si chtěl vypůjčit knížku 3.300 českoesperantských vět pro železniční zeměstnance i cestující, pošlete Kčs 1,20 poštovní známky na adresu: Svačina Fran, Lanžhot, okr. Břeclav.

Tri knaboj kaj tri knabinoj 11 - 17 aĝaj el intereskomununo deziras korespond. Skribu al: Gill Shapley, Wheythill Bruderhof, BROMDON, BRIDGNORTH, Shropshire, England.

### SET 1955

### 3.7. - 13.8.55

Tak jako v letech minulých pořádalo Junularo v Opavě letní kursy Esperanta /SET/, také i letos, jak jste již informováni budou na Vranovské přehradě /jedna z nejdelších přehrad ve stř. Evropě - 22 km/. Tento tábor je určen jak pro začátečníky, pokročilé, tak i pro vedoucí zájmových kroužků Esperanta.

V táboře nebude žádné placené síly a proto si musíme většinu prací, jako nákupy a pod. vykonávat sami. Účastníci budou rozděleni do několika skupin a postupně se vystřídají ve službách.

Tábor má 2 úkoly:

1. Šíření Esperanta mezi mládeží pořádáním Esp. kursů pro začátečníky, pokročilé a vedoucí záj. kroužků Esperanta při záv. klubech a OB., a tím prohlubování vědomostí našeho dorostu.
2. Úkol rekreační; pořádání her, koupání, výlety, vycházky – tím upevňování jejich zdraví.  
Při zahájení každého turnusu budou účastníci seznámeni podrobně s táborovým řádem  
Několik táborových a besedních ohňů zpestří nás táborový večer.

Výstroj a výzbroj pro jednotlivce na SET 1955.

Abychom byli alespoň trochu jednotni, pokud Vám bude možné, ale není podmínkou - co je podtrženo.

<u>1 zelená košile</u>	<u>hnědý baret</u>	<u>nepromokavý plášť</u>	2 pokrývky
teplák. souprava	2 košile	tričko /tílko/	2 trenýrky
plavky	svetr.	3 p. ponožek	tenisky /lehká obuv/
2 ručníky, žínka	krátké kalhoty	polobotky	mýdlo, hřeben
pasta na zuby	kartáček na zuby	jídelní miska	příbor a utěrka
chlebník	čistící potřeby	psací potřeby	zápisník /sešit/
náčrtník	baterka	svíčky	zápalky
píšťalka	kapes.nůž	obč. legitimace	lístek k lékaři

Doporučuje se: Hudební nástroje, kytary, mandolíny a pod.

Slamníky s sebou neberte. Sehnali jsme jich dosti pro všechny. Dodatečné zprávy a slevněnky na dráhu včas přihlášeným budou zavčas zaslány.

# Letní kolej Esperanta – Doksy

17. - 30.7.55

Letos po desáté od konce války je pořádána Letní Kolej Esperanta v Doksech. Již více než půl druhého tisíce absolventů je jistě pozoruhodným výsledkem a důkazem zhodnocení kvalit Koleje jejími návštěvníky. Perspektiva velmi pravděpodobné účasti zahraničních esperantistů je nejen důkazem mezinárodní tradice Koleje, ale i výbornou možností přezkoušet, své nabyté vědomosti v Esperantu.

+++++

LETNÍ KURSY V PŘÍBOŘE budou zahájeny počátkem srpna. Předběžné přihlášky a informace: s. Ant. Satték, Příbor, Dvořákova 744.

## KIEL ASPEKTAS nia laboro?

Ni dediĉu hodiaŭ tiun ĉi paĝon al la pritakso de Esp. junularaj grupoj por povi kelkajn laŭdi por la aktiva agado, aliajn iom admioni por komenci aŭtune kun pli da verovo sian poresperantan laboron.

RD de regiono Praha, Ústí n/L, Kar. Vary. - En sia funkcio li agis tute kontentige kaj regule li sendadis la raportojn. Li ankaŭ bone aplikis la novan konkursmanieron. Liaj raportoj donas tiun ĉi spegulon de la agado en la grupoj de regiono:

P r a h a: Grupo havas 20 membrojn kun entuto 132 poentoj por lingvoscio. La laboro, kiu komence de jaro ne estis tute kontentiga tamen iom post iom pliboniĝis kaj la kunvenoj ekkomencis havi ju pli des pli altan nivelon. Pri tio ĉi plejparto meritas s-ano Novobilský VI., kiu mem preparis programojn. Tiu konsistas el progresema gramatiko, historio, literaturo kaj legado de famaj Esp. libroj. Je fino de programo oni kantas aŭ ludas diversajn ludojn Esp. Iliaj kunvenoj okazas en Malá Strana, Maltézské náměstí, Slepecký ústav ĉiumarde de 19-21,30 horo. La 9-an de marto okazis komitatkunveno kie ili nuligis la ilian malnovan komitaton kaj estis elektita nur loka delegito kiu rajtas peti aliajn membrojn pri kunlaboro.

Ni taksu la agadon de grupo. Ĝi havas sufiĉe da anoj. Ni povas diri, ke 20 gesamideanoj jam formas tuton, kiu kapablas fari certe multe pli ol estis farite. En grupo estas kvin homoj kun klasifiko D. Tiuj ĉi certe povus, esti la animo de grupo. Eble ĝi estas plej forta grupo junulara, sed la rezultoj ne respondas al la kapableco. El kroma agado grupo gajnis 39 poentojn. Kroma agado konsistis el diversaj prelegoj. La ĉeesto en kunvenoj estis krom januaro ĉiam 75%.

M o s t. En tiu loko estas nova LD s-ano Ot. Venda, nám Svobody, Most – Rudoltice 23. Grupo havas malfacilaĵojn flanke de Hornický klub, kies ĝi estas rondeto. Granda propagando estas malpermesata. La aktivoco ankaŭ merite de s-ino Olga Závorková lastatempe kreskas. Estas aranĝataj diversaj etaj vesperetoj. Grupo pretigis el Esp. materialo grandan propagandan montrofenestron. Bedaŭrinde en raporto de RD ne estas menciitaj poentoj, do estas neeble la grupon pritaksi tiuflanke.

Aliaj lokoj el lia teritorio kiel: Karlovy Vary, Poepice, Hříměždice, estas grupoj malfortaj, kie laboras plejparte nur unuopuloj, kaj raportoj ne estas sendataj al RD.

RD de teritorio Hradec Králové - Pardubice. - Post longa silento de RD, denove li ekraportis de monato marto. Li plendas, ke la grupoj en lia regiono ne plenumas la kondiĉojn de konkurso kaj

ne sendadas al li raportojn pri agado. - Vere, ĉu en viaj grupoj estas neniu, kiu foje en monato sendus kiun ajn raporton al RD? Ĉu vi sentas neniun moralan devon pli aktive labori por Esperanto? Mi esperas ke vi pliboniĝos.

L a n ŝ k r o u n: Kelkaj prelegoj komence de jaro iom plenigis la programon de kunvenoj. Tamen grupo kunvenadas nur foje monate. En grupo ankoraŭ daŭrigis kurso por komencantoj. Poentoj por linsvoscio 28, kroma agado 11. Ĉeesto komence de jaro estis bona, en pluaj monatoj jammalpli, ĉeesto 67%.

P a r d u b i c e: La agado malgraŭ tio, ke grupo lingvoscio 46 poentoj /el tio 1 C, 1D kat/ la aktiviĝeostas tre malgranda. En raportoj grupo planas diversajn vesperetojn kun filmoj, aranĝon de ekspozicio, ktp., bedaŭrinde laŭ raporto faris grupo nur unu filmvesperon, alia kroma agado en grupo ne ekzistas. 0 ĉeesto de novembro - aprilo estas 75%.

J a b l o n n é n/Orl: Nova aktiva s-ano Werner Stan. ekkomencis en tiu loko komence de jaro Esp. kurson, kaj ni povas esperi ke per iniciativa laboro li konstruos tie unu novan firman Esp. ĉelon. Ni deziras al li multan sukceson.

C h r u d i m: Ĉar s-ano K.Dušánek foriris soldatservi, mankis la gvidanto de grupo, tial la laboro de rondeto estis ĉesigita.

RD por regiono Ĉ. Budějovice – Plzeň. - La lasta raporto por monato aprilo montras al ni sufiĉe funebran bildon pri la prospero de grupoj en Sudbohemio. Grupo en P í s e k en aprilo finigis regulajn kunvenojn, ĉar neniu havas tempon vizitadi ilin. Dum la lasta kunveno kiu estis iom solena kaj kun ĉeesto 100%, ĉiuj promesis ke aŭtune ili denove eklaboros kaj kontinuos la lernadon. Ni nur esperas ke la fajrero de esperantismo ne estingos en koroj de koncernaj samideanoj. Ankaŭ en grupo P l z e ŝ post la foriro de s-ino Šloufová malkreskis la aktiveco. Tamen sub gvido de s-ano Hořejší oni daŭrigis la laboron. Grupo eldonis unu numeron de "Juna Esperantisto". RD plendas, ke Centrejo neniel helpas al la grupoj en Sudbehemio. Ni devas konfesi ke tiun kontakton kun ĉiuj grupoj devas havi organiza delegito, bedaŭrinde eble pro troŝarĝo en lia privata okupo li multe ne dediĉis sin al siaj devoj. Liaj kelkaj kritikoj kontraŭ Centrejo estas pravaj. Tamen estas necese konscii, ke ĉiu grupo devas agi plejparte el siaj propraj rimedoj kaj serĉi proprajn vojojn al la venko de malfacilaĵoj.

T ř e b í ĉ: Grupo por ĉiuj fortoj estas en preparoj por ĉi jara aranĝota Somera Esperanto-Tendaro en Vranov. Ĝi estas tre aktiva kaj aranĝas 4 specojn de kunvenoj. 1. por knaboj, 2. por knabinoj. 3. por pli aĝaj kun kurso de por progresantoj. 4 kunvenojn de la grupa komitato. Dum kunvenoj estas aranĝataj diversaj prelegoj. Tre aktive helpas al grupo s-ano Kilian antaŭ publiko /85 partoprenantoj/ je temo: Esperanto en batalo por paco. Ĉe tiu okazo estis aranĝita malgranda ekspozicio. La intereso pri Esperanto inter publiko de Třebíč senĉese kreskas. La legantoj mem postulas kurson de Esperanto. Aŭtune estos la kursoj komencitaj. Bedaŭrinde pri la ĉeesto en kunvenoj ne estas en raportoj menciite, oni ne povas pritaksi ĝin. Poentoj gajnitaj per la lingva scio estas en Třebíč 96. Krom agado rezultigas por 80 poentoj. En tio estas jam enkalkulitaj poentoj por la aranĝo de Somera tendaro. Ni povas gratuli al ili pri la sukcesa laboro. En nova jaro, havu via grupo ankoraŭ pli grandajn sukcesojn.

B r n o: Tiu ĉi grupo kvankam ne multmembra tamen enhavas homojn kun tre alta lingvonivelo. Tio rezultigas ankaŭ en kroma agado de grupo, kiu gajnis por ĝi entute 67 poentojn konsistis el la teatroludoj, kiujn ili prezentis por la klubaj vesperoj, aranĝo de diversaj originalaj prelegoj, en tradukado de de kantoj ktp. Per la zorgoj en administraj laboroj por SET mi donas al s-ano Werner 15 poentojn. Kunvenoj de junularo plejparte konsistas el preparo de diversaj teatraĵetoj kaj programeroj. La teatran kolektivon 15 membran gvidas Marta Lorková. Ke la lingvoscio ĉiam kreskas estas videbla el tio, ke 4 membroj intencas submeti sin al la ekzameno de kat. D. Estas evidente, ke ĉi tio kreskas por nia movado kolektivo de altaj kvalitoj. Nur estas necese, ke ili pli multe dediĉu siajn fortojn al organiza vivo de nia Junulara movado. Por lingvoscio gajnis grupo 112

poentojn. Ankaŭ ĉi tie oni raportis pri la ĉeesto dum kunvenoj.

Svitavy: Ankoraŭ ne aliĝis en junularan konkurson, tamen ilia laboro por Esperanto estas por ilia komenco tre aktiva. Aranĝitaj kursoj kun granda sukceso. Kursanoj korespondas kun eksterlando. Aŭtuno ankoraŭ kun pli da vervo en la laboron.

Žďár n/Sázavou. Nove bakita grupo tre bone prosperas kaj evidentiĝas intereso de tuta kolektivo pri la komuna laboro. Grupo enhavas 10 membrojn /7 kat. A, 3 kat. B/ Inter ili estas unu s-ano el Belgio. Ĉiuj membroj en rondo jam vigle korespondas por fremdlando. Tre aktiva s-ano, F. Březina, kiu per multo meritas pri la fondo de grupo skribas en sia raporto: Necesa fundamento por nia movado en nia urbo estis jam metita. En nia komencita vojo ni ne povas halti. Ni devas iri antaŭen, kaj ni promesas al vi, ke ni iros.“ Ni dankas al li por tiaj vortoj kaj ni deziras al ilia laboro multegan sukceson.

El ĉiuj grupoj de tiu ĉi regiono radias ĝojo kaj entuziasmo. Kion vi diras, karaj samdeanoj, ĉu ne meritas pri viaj sukcesoj ankaŭ multe reg. delegito s-ano Werner? Ni ne povas alie, ol kore danki al li por la laboro sur tiu kampo farita.

Kaj ĉu vi demandas kion faras regiono Ostrava kaj Olomouc? Multon vi ne eksciis, ĉar ambaŭ reg. delegitoj ne raportas al Centrejo. Kiu kulpas pri tio? Ĉu lokaj grupoj aŭ mem Centrejo, kiu ne kapablis konvinki koncernajn delegitojn pri la neceso raportadi? Certe tie estas honto por regionoj, en kiuj preskaŭ komencis la junulara Esp. movado. Kaj ĉu ne ekzistas tie la junularaj grupoj? Jes, ekzistas. Kaj multaj el ili estas sufiĉe viglaj: Přerov, Olomouc, Drahotuše, Ostrava, Opava, Třinec. Kiel lepruloj ili vokas: Kial neniuj scias pri ni? Bedaŭrinde rompiĝis kelkaj ĉenoj en nia organizo. Ni provu ilin post kunveno en Otrokovice denove firme kunmeti.

Stato ee konkurso en Opava kaj Ostrava laŭ lasta raporto de RD ĝis monato januaro:

Opava: ĉeesto 82%, lingvoscio 56 poentoj, kroma agado 46.p.

Ostrava: ĉeesto 75 % lingvoscio 60, kroma agado 23.

Opava: Post certa krizo komence de jaro la grupa vivo denove vigliĝis kaj la ĉeesto kaj programoj estis denove pli kvalitaj. Por ĉiu kunveno estis preparita programo - prelegoj - rakontoj ktp. Sed tamen grupo restas ĉiam sur malnova nivelo – ĝi ne progresas, kaj se ni komparas ĝin kun la Opava grupo antaŭa ni devas diri, ke ĝi velkas. Estas necese revekigi iamaniere la iom dormantam situacion tie. Ĉu aŭtuno alportos la plibonigon?

Ostrava: La afero ĉi tie estas preskaŭ la sama. Iamaj brilaj sukcesoj kaj vigla entuziasma laboro malaperis. Sed tamen estas ĉi tie daŭrigataj kursoj kaj grupo almenaŭ vivas. Certe mankas al grupo ia interna spirito. Aŭ mia prijuĝo estas malprava? Kia helpo; sen raporto oni ne povas pli bone taksi la grupon. Pri tio parolu la klubanoj kun la reg. delegito.

Pri aliaj grupoj de regiono Ostrava kaj Olomouc mi ne povas doni eĉ ne tiel etajn raportojn.

Kion diri ankoraŭ ĝenerale?

Eble al multaj ŝajnas miaj opinioj pri Esp. junulara movado iom tro nigraj kaj pesimismaj. Sed tio estus erara observo. Ke mankoj multaj ekzistas en niaj rondoj kaj en nia labori estas klare. Ja, ni faras nian agadon en la Esp. movado nur post nia regula civila okupo, kaj ĉiu, eĉ eta laboro Esperanta devus esti laŭdata. En hodiaŭa tempo, kiam ĉiu el ni nur dronas en laboroj diversmanieraj, signifas ĉiu faro por Esperanto, ĉiu vizito de Esp. kunveno, vere de sia speco – ofero. Sed esperantistoj devas esti iom idealistoj. Ni neniam devas atendi por nia laboro ian rekompencan. Helpi al Esp. movado devas esti nia morala devo.

Kia situacio staras antaŭ ni? Ni esperu, ke dum la Junulara kunveno en Otrokovice estos ĉio al kontento de ĉiuj solvita kaj ke junularo ne eniros ian krizon en sia laboro, sed male ĝi disvolvis ĉiujn siajn fortojn por festi novajn brilajn sukcesojn. Nur estas necese ke al organiza laboro aliĝu junaj kapablaj homoj. Per kia ago respondos junaj s-anoj el Brno, Praha, Třebíč? Ĉu vi helpos al ni? Mi kredas ke jes.

Kaj miaj finaj voortoj: Dum la konferenco en Otrokovice ni solvu ĉiujn demandojn, kiuj pezas nin kiel la granda ŝtono sur nia brusto.  
Multan sukceson al ĉiuj grupoj deziras

Kuzník Jaroslav.

Por supervido ni publikigas la tabelon kiel unuopaj grupoj laŭ la senditaj raportoj de RD viciĝis en nia Junulara konkurso pri scio. Poentojn pri kroma agado Centrejo aprobis post malgarandaj ŝanĝoj ĉe kelkaj grupoj.

Rezulto de Junulara konkuroo pri scio al 30.5.1955.

grupo	lingvoscio	kroma agado	ĉeesto en kunvenoj	poentoj entute	vicigo
Brno	112	67	?	179	1
Třebíč	96	80	?	176	2
Praha	132	39	75%	171	3
Opava	56	46	82%	102	4
Ostrava	60	23	75%	83	5
Pardubice	46	3	75%	49	6
Kroměříž	38	10	?	48	7
Žďár	26	15	?	41	8
Lanškroun	28	11	67%	39	9

o o o o o o o o o o

KION SKRIBIS AL NI NIA LEGANTO el Germana demokrata respubliko.

.... via vigla laboro estas modelo por ni. Bedaŭrinde la kondiĉoj estas ĉe ni tre malfavoraj: nek grupojn, nek kursojn, nek propran gazeton oni permesas. Tamen ni ne malkuraĝiĝos. Fine ni venkos. Ĝis tiam ni edukas per korespondado kaj amikaj senformaj kunvenoj kaj ekskursoj.

P. Glöckner, Pirna Copitz.

## *Junularo, kantu!*

Neniu resonado aŭdiĝis post la en lasta numero de Tagiĝo publikigita alvoko, ke vi skribu ĉu la kantoj plaĉas al vi kaj kiujn vi dezirus publikigi venonte. Do tamen ni esperas, ke nun alvenos multaj leteroj kun kritikoj kaj deziroj.

Al adreso de tiuj, kiuj kritikis malbonan akcentadon en traduko de kanto: En nin ĝardeno - publikigita lastfoje, mi estas komisiita sciigi, ke oni skribu pri tio al la redaktejo de Tagiĝo, kiu transdonos la kritikon al aŭtoro, kiu mem respondos al ĉiu. Li rifuzas kritikon en tiu ĉi senco kaj pruvas ke la traduko krom kelkaj eraroj dum la preso estas korekta. - Do ne forgesu noti tiun ĉi sciigon.

Hodiaŭ ni prezentas al vi tradukon de bela ukraina kanto: Široký Dněpr.



# BRUAS KAJ MUĜAS

Ukraina kanto tradukita de  
Kík

1. Bruas kaj muĝas Dnepro vasta  
ĝemas kaj ploras ventmuĝad'.  
Vibras en lando kanto besta,  
ondoj tordiĝas kun krakad'.

2. Luno tra nuboj brilas ĉaste,  
ridas burleske ĝia vang'.  
Lumas ankoraŭ, sed jam laste,  
de kordoj sonas milda kant'.

3. /Ripetiĝas la unua strofo./

*Jakub Brepta*

## MAJA REMEMORO

De Maja spiro  
viviĝis mila flor'  
kaj kun ĝi ankaŭ  
ekfloris mia kor'.

Raviga sento,  
feliĉ' ĉe mi sen fin',  
ĉar Vin mi trovis  
ho, mia amatin!

## *La afrikaj tamtamoj „lokali“*

Afriko posedas ankoraŭ nuntempe siajn misterojn. Kaj unu el la misteroj estas la telegrafsystemo de negraj lignaj tamtamoj.

Klip ... klop ... klopiti ... klip ... klopiti ...

Proksimume tiel sonas la voĉo de la igna, balbuta lingvo, kiu estas sonigata per frapiloj el mola ligno, batantaj kontraŭ la randojn de fendoj en telegraf-tamtamo, ĉizita el malmola ligno. La mistera voĉo de Afriko. Romantiko ... *a v e n t u r o !*

En la epoko, kiam la homoj en Eŭropo loĝis ankoraŭ en kavernoj, la Afrikanoj eĉ en la plej foraj lokoj de la "nigra" kontinento jam posedis la sendratan telegrafon. Kaj la Eŭropanoj ne nur ne ellernis ĝis nun tiujn ĉi elsendojn, sed ili ankoraŭ ne sukcesis deĉifri ilian kodon, precipe tiun de la *i n t e r n a c i a* lingvo tamtamisto.

La tamtamoj estas rigardataj kiel sanktecaj. La speciala eduko de tamtamisto daŭras dek jarojn. Li ja devas per la tamtano, dank' al sia delikata muzika aŭdopovo, eltamtami la ĉiutagan melodiecon ne nur de sia gepatra lingvo, sed ankaŭ en la lingvo tiel nomata internacia, kiu estas sekreta. Li fine devas ellerni praktike kelkmil signalojn, kiuj distingiĝas kelkfoje nur per nuanceto.

Krom la lingvo, komprenata de ĉiu ano de la respektiva nacio, ekzistas do internacia tamtam-lingvo, kiun komprenas nur la tamtamistoj kaj iuj sorĉistoj. Helpe de tiu ĉi internacia lingvo, al ni nekonata, interkompreniĝas la tamtamistoj en teritorio, kiu ampleksas 80 ĝis 100 milionojn da loĝantoj. Jen klariĝas la sekreto de rapida interkompreniĝo de la afrikaj popoloj, malgraŭ ke unu ne konas la gepatran lingvon de la alia. La tamtamistoj estas la unusolaj tradukantoj.

Pri la preciza informado, faratajn helpe de tamtamoj, mi konvinkiĝis en oftaj okazoj.

"Klip ... klop ... klopiti ... klopiti ..."

"Blankulo venas ... blankulo ... venas ... gvidisto ... bona ... bona ... blankulo ... nigraj viroj

kun valizo j . . . nigraj viroj ... blankulo ... bona ... venas el Sankuru ..."

Tiel tekstis la avizoj de la fraplingvo de lignaj tamtamoj, kiam mi estis migranta en la regiono Sankuru. Mi foje trafis en malbonan situacion, frakasinte mian korkan kaskon. Sed kiam mi atingis la vilaĝon Dieka en la teritorio de Bateteloj, atendis min granda surprizo: salutis min eŭropa komercisto Leduck. "Mi ŝatas vidi vin. Mi intencis forveturi jam antaŭ unu senajno, sed mi prefere atendis vin, sciante, ke vi bezonas novan kaskon."

Estas nekalkulebla la nombro de tiel ĉi ĝuste avizitaj okazintaĵoj. Sed tiuj ĉiutagaĵoj estas superitaj de informoj, kiuj havis internacian signifon kaj kiuj estas zorge notitaj en la samtempa scienca literaturo pri la afrikaj telegraf-tamtamoj, kaj, ankaŭ dokumentitaj. La sciigitaj informoj priskribis okazaĵojn de ekster la afrika kontinento.

Ekzemple la sciigo pri paco post la unua mondmilito. Kiam la malamikeco en la okcidenta fronto estis ĉesigita, la vorto "Paco" venis al Salisbury je tri semajnoj pli frue ol oficiala telegramo. La vorto "Paco" estis elsendata per la ligna tamtama radiofonio kaj flugis tra la tuta afrika kontinento. Ĝi ŝajnas nekomprenebla, sed ĝi estas klarigebla.

"La paco paŝas tra l'arbaro . . . Paco ... Volu pacon . . . Venos homoj ... Ili parolos ... Donu vian konsenton! ..." Tiel tekstis la enkonduka frazo, kiu transdonis la peton de la subskriba kampanjo por la stokholma pac-alvoko, post la dua mondmilito. Ĝi estis unu el grandegaj surprizoj por la administraj oficoj, kiuj vane volis malhelpi tiun ĉi kampanjon en vilaĝoj, dissemitaj en praarbaroj kaj sur ebenoj. Kaj la analfabetaj afrikanoj subskribis, stampante sian dikfingron sur la subskrib-foliojn.

Mi eksperimentis en la j. 1954 kun malgranda 50-centimetra tamtamo, kiu havas atingopovon kvin km, en Krkonoŝe. La rezulto estis surpriza. La feriuloj en la Špindler-hotelkabano, antaŭinformitaj pri la dissendo, havis la impreson, ke la tamtamo troviĝas tute proksime de ili, kvankam la distanco estis 3 km. Per du- ĝis kvar-metraj tamtamoj oni povas interkompreniĝi en la distanco eĉ. 30 km. Kaj plej interesa fakto en la telegraf-sistemo estas, ke la atingopovo daŭras ankaŭ tion, kiam blovas la kontraŭvento.

La fondintoj kaj pliboniĝintoj de tiu ĉi telegraf-sistemo de Afriko - kiel ligitaj kun la naturo ili devis esti! Kaj kiel atente ili devis observi ĉiujn kondiĉojn por ĝuste disloki siajn telegradstaciojn, kiuj devas neniam malfunkcii!!!

/Por la "Tagiĝo" resume tradukis J. Mařík laŭ rakontado de vojaĝisto L.M. Pařízek en "Věda a technika mládeži"./

## ŜIPANO RAKONTAS

Foje ni veturadis sur la ŝipo, kies direktilestro havis tre strangan edzinon kaj ĉian sekan gorĝon. Tuj kiam li ricevis salajron, li devis senprokraste ĉion fordoni al sia edzino, kiu multfoje akompanis lin ĝis la kasejo, kie ŝi tuj la monon forprenis de sia edzo, por granda amuziĝo de ĉirkaŭrigardantoj."

Do nia direktilestro ne povis aĉeti por si eĉ bieron kaj por malsekigi lian ĉiam sekan gorĝon li kolektadis kaj vendadis malnovajn boteletojn, de tempo al tempo li sukcesis kapti ion angilon kiun li povis vendi. Estis ankaŭ semajnoj, kiam ne sukcesis la etaj artifikoj kaj trompoj, kaj tiam lia kapo ĉiam malsuprenklinis. Sed foje tamen la foto, kiu tiel punis lin, estis por li favora.

Ni staris en pli granda Odra haveno atendante la pli altan rivernivelon. Sinjorino direktilestrino trikis. por sia edzo belan lanan trikaĵon por vintra sezono kaj estis per sia laboro tiel okupitac, ke ŝi forgesis forpreni la ŝlosilon de tirkesto, kie ŝi havis monon. Direktilestro malgaje vagadis tra la ŝipo, ĝis kian ia bona nimfo inspiris lin viziti sian ĉambron. Ho kia fajro aperis en liaj okuloj, kiam li ekvidis la malŝlositan tirkeston. Rapida ĉirkaŭrigardo, unu salto, kaj jam troviĝis unu bankbileto en lia pugno. Rapide kaj neatendite li alvenis nian kajuton, kiu trovigas en antaŭkilo de la ŝipo kaj petegis miann kolegon, ke li tuj alportu la botelon de viskio kaj alvenu kun ĝi al lia edzino, ĉar ŝi morgaŭ havas nomtagon. La kolego estante kun direktilestro parenca laŭ gorĝo,

volonte prenis la bankbileton kaj post ne longe revenis kun botelo da likvoro, gratulante al sinjorino direktilestrino ĉe okazo de ŝia nomtago kaj malfermante la botelon, li komencis plenigi la glasetojn kaj trinki por ŝia sano.

La direktilestrino nur kaŝe ridetis kaj poste, kiam la boteleto estis jam nalplena, li ekparolis al sia edzino: "Tiu ĉi ordinara ŝipano alportis la boteleton por via sano kaj vi, edzino de direktilestro donis nenion.

"Ĉu vi ne hontas?" Tiu parolado efikis. Ŝi saltis malsupren en la kajuton, el la tirkesto prenis la bankbileton eĉ ne observante, ke la ŝlosilo troviĝas en ŝlosa kaj forkuris en butikon, el kiu ankaŭ ŝi alportis la boteleton kaj ankaŭ kelkajn pecojn da cigaroj, per kiuj ŝi regalis mian kolegon kaj sian feliĉan edzeton. De tiu tempo la ŝlosilo ĉiam troviĝas en ŝlosa kaj jen, okazis miraklo, la edzo, por kiu la monŝtelado perdis sian sorĉon, ĉesis trinki kaj nun komencas legi librojn pri abstinenco.

Sek.

## 11 Ellerni!

Paĝo el la literaturo

Dr. Kazimierz B e i n:

Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe,  
Droninta vive en la morto,  
Kia mister-malica forto  
Vin povis de ni preni rabe?  
Ni lernis de vi lernantknabe  
Kuiiri en la stilretorto  
Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe,  
droninta vive en la morto!  
Kaj nun ni miras gape, strabe,  
Pri via karier--aborto.  
Al vi la Esperanta vorto  
Nun eble jam sonas arabe...,  
Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe!

K. Kalocsay "Rimportretroj"

Dr. Kazimierz Bein naskiĝis en jaro 1872. Laŭ profesio li estis eminenta pola okulkuracisto, aŭtoro de ampleksa faka verkaro. Dro Bein kies artikoloj kaj tradukoj aperis sub pseŭdonimo (pli bone mallongigo) KABE, apartenis en la komenca periodo al plej aktivaj kaj fervoraj batalantoj por internacia lingvo Esperanto. Domaĝe nur, ke fine Kabe forlasis la ideon de Esperanto, kies fidela defendanto li estis kaj lia lerta plumo mutiĝis .... Dek tri supraj versoj de Kalocsay estas vera portreto de la Esperanta kariero de Kabe.

Tamen Kabe apartenis al plej fekundaj kaj plej talentitaj tradukantoj. Lia stilo estis kaj estas ĉiam modelo ne nur por komencantoj, sed ĝi estas laŭde rekonata de la plej bonaj literaturistoj. Jen Kalocsay, la majstro de vorto diras :

Ni lernis de vi lernantknabe  
kuiiri en la stilretorto ....

Kabe ne verkis originale. Li postlasis al ni nur tradukojn, pro sia konvinko, ke en la komenco multe pli utilas traduki ol verki originale. La mondo unue devas esti konvinkita, ke lingvo internacia kapablas interpreti ideojn de mondverkoj same bone kiel nacia lingvo. Se la lingvo venkos sur tiu kampo, malfermiĝas antaŭ ĝi vastaj horizontoj de originalaj verkoj.

El lia ampleksa traduka laboro ni nomu jenajn verkojn:

Patroj kaj filoj	.....	originalo de I.S. Turgenëv
Fundo de l' mizero	.....	de Sieroszewski
Faraono	.....	ampleksa, tri voluma historia romano de pola verkisto B. Prus! La verko estas tre populara kaj ŝatata. Loko: antikva Egiptujo. Ramses XIII.
La interrompita kanto	.....	de Orzeszko
Elektitaj fabeloj	.....	de Grimm
Versaĵoj en prozo	.....	de Turgenëv
Pola Antologio		
Internacia Krestomatio		
Vortaro de Esperanto	.....	aperis en 1910. 175 paĝoj. En la vortaro li klarigas esperantajn vortojn Esperante. La vortaro fariĝis bazo sur kiu estis prilaborita nuna Plena Vortaro, eldonita de SAT en Parizo.

Por ke vi konatiĝu kun stilo de Kabe, ni rekomendas al vi tralegi fame konatan Faraonon, kiu ne nur pro la bela Esperanto, sed ankaŭ pro interesa enhavo allogos vin!

### Dro Stanislav S c h u l h o f

El la ĉeĥaj Esperanto-verkistoj, kiuj apartenas al malnova periodo ni elektas dron /MUDr/ Stanislav Schulhof /1864-1919/ dentkuraciston en Pardubice. Li apartenas al viglaj esperantistoj. Liaj literaturaj verkoj longe ne estis taksataj laŭ ilia efektiva valoro. Nur post la morto de la poeto dediĉis al li Kolomano Kalocsay sur paĝoj de Literatura Mondo detalan studon kaj taksis lin tre alte kaj aprezis lian literaturan influon.

Krom tri originalaj verkoj li tradukis el ĉeĥa literaturo malgrandan antologion.

Per espero al despro	.....	poemkolekto, kiu vekis sufiĉe grandan intereson. Interesa estas vorto "despero", kiu anstataŭas vorton malespero. Ĝi estas neologismo ne akceptita de esperantistaro.
Kion la vivo alportis		
Aŭtunaj floroj	.....	enhavas poemojn el kiuj kelkaj impresas vere neforgesebla.
Bohemaj grenatoj	.....	estas malgranda antologio de ĉeĥa literaturo. Enhavas entute 16 poemoj de Bezruč, Ĉech, Březina kaj aliaj.

### A. K o f f m a n

estas Ruso. Li estis unu el plej talentitaj poetoj de unua periodo. Kelkaj riproĉas iam tro arkaikan stilon. En siaj poemoj li ofte tre noble priantis Esperanton.

Li estas ekzemplo de esperantisto tre reformema, kiu fine bedaŭrinde ne komprenis la situacion kaj transiris al IDO.

Li riĉigis nian literaturon per multaj poemoj kaj jenaj tradukoj:

Kain	.....	de Byron
Iliado	.....	tradukita nur parte
Faust	.....	de Goethe (tradukitaj nur fragmentoj)